SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 28 n-ro 4(126) 30.08.1977.

# ...EL REGIONOJ DE LA MEMO

(T. TYBLEWSKI, JELENIA GÓRA, POLLANDO)

La vorton *memo* oni uzas nur tre malofte en parolo. La memo estas subjekto de psika vivo; ĝi estas tio, kio -spite al ŝanĝemo de la homo - daŭras konstante, reziste je modifoj; dank'al ĝi ĉiu konscias sin mem kaj neniu povas misigi sin kun aliulo.

Ĉu en la embuske ŝanĝebla realo ĝuste ĝi - la memo - ne estas la sola kriterio de la vero? La memon oni devas uzi, spite al la perforto de la ĉiutaga parolo, el kiu la vorto preskaŭ malaperis. La homoj kvazaŭ forgesis pri sentoj forpuŝinte ilin en la plej mallarĝan marĝenon de la privateco, de la intimeco. Estas objektiva fakto, ke en la homa psiko la *intelekta* sfero estas limigita. Ĝi estas subigita al pli fortaj emocioj kaj impulsoj, kies regado ankoraŭ formas la regionon apenaŭ rekonitan. Eble pro tio, ke nur malofte kaj malgraŭvole oni eligas emociojn el la marĝeno de sia konscio?

Inter socidevenaj faktoroj de la homa personeco unu el la plej signifaj estas la *subjektiva memo* - la imago pri sia persono, formita sub la influo de aliaj homoj, de la gepatroj, gefratoj, konatoj, najbaroj kaj samaĝanoj. Ĝia formiĝado estas longa procezo, kiu realiĝas sen plena kontrolo de propra konscio.

*La memo respegulata* estas aro de imagoj, kiajn ĉiu kreas por si dank'al pritaksoj de la medio kaj helpe supozoj kiel oni opinias pri li (ŝi). Ĝi influas la homan konduton rilate al aliaj homoj, ĉar oni klopodas adapti la kondutojn al la imagoj pri tio kiel oni estas pritaksataj.

Jam en la frua periodo de mia esperantisteco unu el la ĉefaj demandoj, kiuj formiĝis en la konscio, iel eksterfraze, ekstervorte estis: Ĉu estante uzanto de la internacia lingvo mi povas konduti simple, kiel ĉiu alia homo, aŭ mi devas manifesti aliecon?

Kvankam argumentado de opoziciuloj - legita, aŭdata, divenota - logis, mi pli kaj pli subiĝis al la influo de racio, esprimiĝanta en konstatoj de scienco kaj konfirmata en kuro de la praktiko. Strebante al la intelekta kaj morala idealoj, mi kulturis la internacian lingvon, kiun mi ekkonsideris la ŝanco kompensi tiujn mankojn, kiujn mi kvazaŭ heredis naskiĝinte en difinita loko; ĉar mi konsideris la lingvon rimedo kontaktiĝi kun la riĉega fonto de la valoroj, kiajn al la individuo povas liveri la diversgentaj - aliaj homoj.

De la unuaj kortuŝoj pro la alveno de leteroj el fremdaj landoj, tra la ekscitoj de la unua konversacio, ĝis la emocioj de prelegado kaj verkado en Esperanto - mi paŝis al pli supraj tavoloj de la konscio, direktata de la memo. La novaj travivaĵoj signis en mia psiko neforigeblajn spurojn - la povon vidi aferojn nove, alimaniere, kontraŭskeme, pli amplekse. Post jaroj mi konstatis, ke la pliampleksiĝo signifas neeviteblan internacieciĝon de la pritaksado.

Kiel tamen esprimiĝas la internacieco? Ĉu en tio, ke oni scipovas komponi leteron al eksterlanda korespondanto? Ĉu en la kapablo konversacii dum Universala Kongreso? Ĉu en la povo facile kontaktiĝi kun civitanoj de la plej diversaj regionoj de la mondo? Ĉu eble en tio, ke oni ekposedas kuraĝon publike opinii spite al la ĝenerala konvinko?

Ekipitaj per la escepta rimedo, kia estas la internacia lingvo, oni povas ja pseŭdoprofiti ĝin - korespondante, babilante, uzante prudentajn sloganojn en la Internacia Lingvo, sed restante senŝanĝaj provincanoj de sia propra spirito.

El la duboj - kiel agi por esti esperantisto - naskiĝis la sola principo: antaŭ ol esti internacia, mi estu interhoma! La principo devigas rilatiĝi kritike al tio, kion mi reprezentas per si mem - dubi pri la klero, pri justemo, ne fidi al la propra prudento, elekti el inter kelkaj ebloj de la solvo tiun, kiun - en imago - aprobus ankaŭ aliuloj.

Kulturo estas ja la komplekso de la lernitaj kondutoj kaj iliaj rezultoj, kiujn generacioj transdonas al membroj de la socio. Relative ofte oni misas, ne diferencigante *la realan* kulturon disde ĝiaj teoriaj priskriboj.

Dume oni devas kun la plena respondeco konsciiĝi pri la ekzisto de *la evidenta* aspekto de la kulturo - esprimiĝanta en kondutoj de la socianoj kaj *la kripta* kulturo, kiu ampleksas ĉiajn psikajn statojn, kies ekzisto kaj daŭro povas esti nur supozataj laŭ la observataj kondutoj. La observanto, kiu ne scias, kiaj kondutoj estas *altrudataj* far la socio al ĝiaj membroj, ne povas travidi la fasadon de la konformismo aŭ eĉ la uniformismo de la socio, do li ne povas ekkoni la veran individuon. La maniero reagi je la difinita situacio donas pli bonan respondon

je la demando, kion oni instruis al la individuo, ol - kia estas lia (ŝia) personeco.

La reagoj informas antaŭ ĉio, ke la difinita individuo havas normalan kapablon lernadi kaj tial li (ŝi) reagas je situacioj same kiel la plejparto de la socio.

La personaj inklinoj, la aŭtentaj *sintenoj* povas manifestiĝi ne en la modeligitaj reagoj, sed - ĉefe - en la deflankiĝoj de la kulturaj modeloj. La deflankiĝoj tamen estas kaŝitaj kaj evidentiĝas en la situacioj, kiam emocioj ne permesas sufiĉe memkontroliĝi. Kiam oni demandas, per kiuj nocioj difini kvalitojn de personeco, ŝajnas, ke la plej konvena por tio estas ĝuste la nocio de *sinteno*, difinata jene: "kaŝita en la dinamika stereotipo, relative konstanta, akceptita inklino (pretemo) konduti sammaniere rilate al difinitaj personoj, situacioj, fenomenoj ktp." Ĝi - la sinteno - estas ankaŭ la pretemo sentadi reage je la impulsoj de la ĉirkaŭo, el la medio kaj tia kuro de la sentoj, kian ĉiu homo (la matura) plene respondecas morale. Do la sintenoj estas konstantaj konsisteroj de personeco kaj povas esti modifataj kaj pritaksataj.

La naŭdekjara historio de Esperanto alportis gravajn pruvojn, ke ĝi estas aplikebla en ĉiu vivobranĉo, kie aperas la bezono interkompreniĝi. Ekde la vivo familia ĝis la verkado literatura aŭ scienca.

Esperanto, pro siaj strukturaj kvalitoj, plenumas funkcion de la integra faktoro. La facileco, kun kiu ĝi transportas informojn; ĝia socia portanto kaj relative vasta amplekso faras, ke la lingvo neniigas aŭ almenaŭ limigas en iuj medioj la naciajn aŭ regionajn antaŭjuĝojn.

Tamen la manko de la ŝtato, en kiu Esperanto estus uzata kiel la lingvo oficiala, kaŭzas de tempo al tempo la elpaŝojn kontraŭ la lingvo. Sed ĉu kontraŭ la lingvo aŭ kontraŭ la uzantoj? Antaŭ ol oni povus respondi la demandon, oni devus fiksi ĉu la esperantistaro reprezentas ian kulturan modelon, manifestante la evidentan aspekton de la internacia kulturo. Ŝajnas, ke oni rajtas konsideri kiel modelerojn - la kongresojn, la somerajn universitatojn, la belartajn konkursojn, la artfestivalojn, la somerajn universitatajn kursojn, la internaciajn ripozojn k.a., dum kiuj estas aplikata la internacia lingvo. Ĝuste la aplikado de Esperanto estas la modelero de la esperantista kulturo.

## Esperantisto kaj internaciisto

Tamen esti esperantisto ne samsencas esti internaciisto. La unua indikas la intelektan scipovon, la dua - la psikan kvaliton de la individuo. Esperantistoj relative ofte manifestas siajn deflankiĝojn de la modelo dum kolektivaj aŭ individuaj rilatoj kun neuzantoj de la lingvo.

Ĝuste tiuj deflankiĝoj kaŭzas defendajn reagojn de aliaj homoj. Ĉu la deflankiĝoj estas sintenoj aŭ nur la lernitaj kondutoj subigitaj al la modelo?

Kiam oni meditas pri senco de internaciismo, oni ne rajtas eviti jenajn konstatojn. La principo de internaciismo proklamas amikecon kaj kunlaboron inter nacioj de la mondo en la strebado al libereco kaj progreso, do akorde kun tio oni povas agnoski la principojn de la edukado sur bazo de la kunlaboro kaj interkompreno inter la nacioj, proponataj de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj. Laŭ la principaro oni devas instrui kaj informi pri la vivo de diversaj nacioj, pri iliaj esperoj kaj aspiroj, pri la problemoj kaj obstakloj, pri la atingoj kaj sukcesoj kaj pri la partopreno en la homara kulturo. Oni ankaŭ devas montradi, ke malgraŭ kulturaj diferencoj la naciojn kunigas aŭ povas kunigi la ideoj de solidareco kaj frateco kaj komuna respondeco pri la sorto de la homaro.

La idealoj de internaciismo strebas pli alte. Ni provu difini la psikajn kvalitojn de la matura sociano, kiu internaciiĝas. Koncerne la *scion kaj sperton* la homo kun internacia sinteno devus koni kaj kompreni devenon de la ideo de la internacia kunlaboro. La individuo devus scipovi rilatigi la idealojn al la historio de socio kaj kompreni, kion signifas realigi ilin en la politika praktiko. La individuo devas ankaŭ konscii aŭtentajn obstaklojn kaj samtempe la taskojn starantajn antaŭ la homaro kaj precipe antaŭ lia (ŝia) nacio. Tio permesos al li (ŝi) memstare, sendepende rilatiĝi al la eventoj de la nuntempa mondo laŭ la vidpunkto de la internaciismo.

La sinteno de la internaciismo ampleksas ankaŭ *konceptojn kaj konvinkojn* de la individuo. La ĉefa el ili estas profunda konvinko pri la egala rajto de ĉiu nacio esti feliĉa kaj memstare ekzisti, do decidi pri sia sorto. Alia nepra konvinko estas tiu pri la paco, reciproka kunlaboro kaj plena interkompreno de la nacioj. Krome ankaŭ, ke la devo de ĉiu nacio estas la kontribuado al socia evoluo kaj humanisma idearo en la tuta mondo, kio signifas la bezonon solidariĝi kun ĉiuj progresemaj homoj sendepende de iliaj nacia, ŝtata, rasa aŭ religia apartenoj.

La internaciisma sinteno ampleksas ankaŭ *emocian sferon*. Ĉi-rilate estas necesaj: emocia impresiĝemo je la socia situo de alinacianoj; la scipovo aŭ kapablo persente reagi je ĉiu perforto kaj maljusteco kun la samtempa pretemo solidariĝi kun tiuj, kiuj kontraŭstaras la perforton. Alia nepra sento estas la aŭtenta estimo kaj aprobo por la ideo de internacia kunlaboro kaj proksimiĝo.

Koncerne al *motivaro* la sinteno anhavas la pretemon batali por realigo de humanismaj idealoj en la mondo, kio signifas la partoprenon de

la individuo en la internacia kunlaboro kaj peraga kontraŭstarado al ĉiaj sloganoj kaj agoj (al la politiko per kiuj estas minacataj la rajtoj de iu ajn nacio aŭ la paca kunekzisto).

Ĉi tiu - probable nekompleta - trarigardo de la konsisteroj de la internaciisma sinteno permesas ekkonscii, kia grava kaj respondeca kaj samtempe malfacila estas la rolo de la internaciisto. Por kompletigi la bildon, ni ankaŭ trarigardu necesajn *interpersonajn* sintenojn, kiujn ja devas posedi kaj evoluigi ĉiu esperantisto, por rajti konsideri sin la interhoma. Ni memoru, ke oni ekestas esperantisto antaŭ ol oni povas transformiĝi en internaciiston. Scipovi rilatiĝi al bezonoj de diversaj individuoj estas la ebleco pli frua (se aŭtenta) ol la scipovo senti aŭ kompreni alian nacion.

## Aliaj gravaj sintenoj

Oni observas, ke la universala homa bezono estas la estimo por si mem. Ĝi eliĝas el la sento de propra digno kaj la strebo al propra valoro. Ĝin formas la indluo de aliaj homoj (ni memorigu pri la memo subjektiva). Ĉiu individuo deziras atingi flanke de la medio almenaŭ minimumon de agnosko. Ĉiu travivas malplezuron - malestimata kaj priridata. La pretemo al favorema rilato al tiaj bezonoj de alia homo povas esti *la sinteno de estimo por digno*.

Natura por ĉiu homo estas la deziro konservi sian vivon kaj sanon kun la inklino eviti suferon. Kompreni tion signifas posedi *sintenon de estimo por vivo kaj sano*.

La homan psikon karakterizas la bezono akcepti aprobon por siaj konceptoj aŭ almenaŭ atingi respekton, se oni ne samkonceptas. La atendo signifas deziron, ke oni ne diskriminaciu malsamajn konvinkojn. Povi tion atestas pri la posedo de *sinteno de toleremo*.

Ĉiu homo atendas apogon kaj helpon de aliaj. La faktoro determinanta forton de la atendo estas la reciproka rilato inter la homoj (ekz. plenaĝulo - infano, sana - lama ktp.) aŭ la kontakto mem. La pretemon plenumi tiajn atendojn ampleksas *la sinteno de protektemo*.

Universala homa bezono estas tiu, ke oni respektu alies propraĵon. Tio koncernas ne nur la materian propraĵon, sed ankaŭ ĉian (la spiritan), ekz. reputacion, sekreton, inventon, tempon ktp. La individuo deziras libere disponi pri tio, kio apartenas al li (ŝi). Tiu, kiu emas agnoski tiajn dezirojn de aliuloj reprezentas *la sintenon de respekto por proprieto*.

Tre gravan rolon en la homa vivo plenumas ankaŭ la bezono ricevi informojn. Ĝi estas la kondiĉo de efikeco de la homa agado. La informoj indikas ekz. nepron de la agado kaj orientiĝas al ĝiaj rezultoj. En la

socia vivo, kiam la individuo ne povas mem atingi ĉiajn necesajn informojn, oni atendas ilin de aliaj. La pretemon respondi je la atendoj esprimas *la sinteno de honesta informado.*

La profunda homa bezono koncernas resentadon flanke de aliaj personoj. En la vivo de individuo ofte la plej gravan signifon havas la konscio, ke ĉio de li travivata renkontiĝas kun alies kompreno, solidareco aŭ eĉ apogo. Precipe tio gravas en diversaj zorgoj, ĉagrenoj kaj psikaj depresioj. Kiu scipovas senti kun aliaj, reprezentas *la sintenon de samsentado.*

Konata al ĉiu kaj sentata de ĉiu estas la bezono libere disponi pri si mem. Ĉiu individuo havas la propran koncepton pri sia feliĉo kaj strebas al ĝia realiĝo. La provoj altrudi iujn aliajn konceptojn vekas malkontenton, la senton de fiasko. Enmiksiĝado en ies koncepton de feliĉo povas okazi en du cirkonstancoj: en manko de la socia matureco de la individuo aŭ pro socia minaco de ies streboj. En ĉiu alia situacio oni povas agnoski la rajton de la memdecidado. Se oni emas agnoski, oni posedas *la sintenon de respekto por individua aŭtonomo.*

Nun - kompreneble ankaŭ kun supozo, ke ne ĉio estas nomita - ni povas konstati, kiel malfacila tasko staras antaŭ ĉiu, kiu emas esti interhoma (interpersona). Se esperantisto decidas lerni la internacian lingvon, li i.a. esprimas la emon esti interhoma kaj ĉi-cele li bezonas la interkomprenilon. Tamen ekposedi la lingvon entute ne signifas transiĝi psike. La fakto estas apenaŭ la ŝanco de metamorfozo, kiu tamen ne sekvas aŭtomate. Ĝi estas tre longa, malfacila kaj fine raviga procezo, kiun oni - nemalofte - devas pagi per la perdita trankvilo kaj bonrilatoj en sia loka medio.

Esti ja internaciisto signifas transformiĝi, aliiĝi, do malsimiliĝi disde la homoj, kun kiuj oni vivis ĝis nun eĉ en plena harmonio. La sorto estas neevitebla. Se oni kuraĝas ekesti alia, oni devas riski ĉiujn sekvojn de la metamorfozo. Posedante ĉiujn supre proponitajn sintenojn de la interpersonulo, oni povas kontinui la pacan kunekziston kun aliaj individuoj, sed oni jam ne liberiĝos de la scio, sento kaj sperto, sur kiu baziĝas onia internaciismo.

Por armigi sin kontraŭ minacoj de la stato, en kiu la akirita kvalito estas suspektata aŭ eĉ atakata flanke de ĝisnunaj harmoniaj kunvivantoj, se ili mem internaciiĝis, oni devas ekposedi la rimedon - la emon memperfektiĝi kun konscio de la ĉefaj celoj de la strebado.

Ŝajnas, ke pro la sociaj realoj, en kiuj esperantistoj vivas en siaj nacioj, la plej konvena afero de ilia influado al aliaj estas *kulturo.* Sekve de tio mi opinias, ke ĉiu esperantisto (eble antaŭ ĉio la esperantista elito) devus klopodi formi en si kaj evolui *la porkulturajn sintenojn.*

Jen kiajn:

La komenco de la ĝusta rilato al la kulturo devas esti agnosko de ĝiaj valoroj, taksataj senprofiteme ĉefe pro la ligitaj kun ili travivaĵoj. Tian rilaton povas respeguli *la sinteno de respekto por kulturo.*

El la ekzistanta respekto naskiĝas la ekinteresiĝo por manifestoj de la kulturo, por ĝiaj verkaĵoj, por manieroj de agado esprimantaj ideojn, moralajn principojn, konceptojn, sociajn estetikajn, politikajn doktrinojn. Esprimus tion *la sinteno de interesiĝo pri la kulturo.*

Ĉi-supra devus esti la elirpunkto por konstantaj streboj al la kunestado kun diversaj kultureroj, al kulturbezonoj, kies neplenumo vekas la senton de manko, kaj kies plenumo alportas kontenton kaj pliajn bezonojn. Ĝi estus *la sinteno de kontakto kun la kulturo.*

La kulturo kiel la tuto multgenta kaj komplika, ampleksanta tiel diversdevenajn konsisterojn kiel materiaj produktaĵoj kaj ideoj, sed ankaŭ modelojn de agado, metodojn, modelojn kaj valorojn - ĝi postulas impresemon la sensan, la emocian kaj la estetikan kiu favoras al la pretemo travivadi la belon de kulturo kaj la perfektecon de ĝiaj manifestoj. La favoro povas esprimiĝi en *la sistemo de ŝato al belo kaj grandeco de la kulturo.*

La propra evoluo, estanta la rezulto de la nekonformaj kontaktoj kun kulturo kaj de travivado de ĝia grandeco, devus konduki al la bezono de konstanta kulturpartopreno laŭ la atingeblaj, sed la plej perfektaj modeloj, en la stilo karakteriza ne por la propra socia grupo, sed dependa de siaj imagoj pri la kulturidealo. Respegulas tion *la sinteno de konstanta partopreno en la kulturo.*

El multaj faktoj de la partopreno sekvas difinitaj efikoj, kiuj povas naski bezonon de la verkado kaj bezonon esprimi en la verkado siajn psikajn statojn, premojn de la kreimagoj, la subtilojn de sentoj. La deziratan pretemon manifesti sin eĉ en la plej etaj kreaj fenomenoj de la individueco devas respeguli *la sinteno de la krea manifestiĝo.*

Pri efikeco de sia rilato al kulturo decidas ankaŭ la pretemo rilatiĝi al aliaj homoj, eĉ se mankas formalaj ligoj kun ili. Ĝi estas la deziro, ke aliaj atingu la samon aŭ pli, kion posedas jam mi mem, ke ili ne ĉesu je la ĝisnuna nivelo. Al tia influado je aliaj certe helpus la *sinteno de la kultura perfektigado de sia medio.*

+

+ +

La plejparto de ĉiu socio estas homoj, kiuj ne havante antaŭ si ian imitindan modelon de la homo, erarserĉas en multaj duboj, kiaj esti. Se en difinita loko aperas aŭ ekestas esperantisto, li devus scipovi ekroli kiel modelo por aliaj. Sed ĉu ni scipovas?

Revenante do al la demando, prezentita ĉe la komenco de la nuna

meditado: ĉu, estante esperantisto, oni povas konduti simple aŭ oni devas manifesti aliecon, mi povas respondi nur tiel:

1. estante la interhoma (interpersona), oni devas reprezenti ĉiajn sintenojn, dank'al kiuj oni meritos kvalitojn de interhomeco kaj - efike - la aprobon de la medio;

2. estante la kultura, oni klopodu proksimiĝi al la imagata idealo, al la perfekto, aprobebla por si kaj por aliaj;

3. atinginte la konscion de la interhomeco kaj kultureco, oni rajtas pretendi al la internacieco, akorde kun la aprobata principaro.

Krom tio, krom la transformiĝo de la konscio, oni povas esti tute simpla, eble eĉ pli simpla ol antaŭe, atinginte la profundon, kiu povas samiĝi kun la alto.

Esti nenia - griza, indiferentiga, sensenta, malimpresa, senkonvinka kaj senideala - oni ne rajtas, se Esperanto ekiĝis aŭtenta valoro de nia memo.

## LA FONTOJ


*W.Epstein, F.Shontz:* Psychology in progress. New York 1971. Holt, Rinehart and Winston, Inc.

*W.Bormann:* Bona Ŝanco. La Laguna 1970, "Ŝtafeto"

*Z.Cackowski:* Główne zagadnienia i kierunki filozofii. Warszawa 1973, "Książka i Wiedza", 5 eldono

*A.Kłoskowska:* Społeczne ramy kultury. Warszawa 1972, PWN

*R.Linton:* The Cultural Background of Personality. New York 1945, D. Appleton-Century Co., Inc.

*J.Kuczyński:* Żyć i filozofować. Warszawa 1969, "Książka i Wiedza"

*V.Lebrun:* Leo Tolstoj - homo, pensulo, reformisto. "Panoramo" 1974 n-ro 1/2

*Th.Newcomb, R.Turnar, Ph.Converse:* Social psychology. New York 1965, Holt, Rinehart and Winston, Inc.

*H.Muszyński:* Ideał i cele wychowania (Idealo kaj celoj de edukado). Warszawa 1974, WSiP, 2 eldono

*L. Turos:* Andragogika. Warszawa 1975, PWN

*T.Tyblewski:* Esperantismo - la faktoro de internacieca edukado. Jelenia Góra 1968, tajpaĵo de magistriga disertacio

- Esperantyzm w Polsce i na świecie. "Oświata Dorosłych" 1970 n-ro 6
- Metamorfozo. "Esperanto" 1971 n-ro 10
- Eduke ĝusta. "Norda Prismo" 1972 n-ro 3
- Psikosociaj efikoj de internacia turismo. Bydgoszc, 1975, PEA - Monda turismo
- Ideał wychowawszy w turystyce. "Ruch Pedagogiczny" 1975 n-ro 6

*K.Wojciechowski:* Wychowanie dorosłych (Eduko de plenaĝuloj). Wroclaw 1973, "Ossolineum", 2 eldono

*B.Zawadski:* Foundations of personology. New York 1967

*Z.Zaborowski:* Stosunki miedzyludzkie a wychowanie (Interhomaj rilatoj kaj edukado). Warszawa 1974, NK